

## VEDEM – LA VIVO DE INFANOJ KAJ PLENKRESKULOJ EN LA KONCENTREJO TEREZÍN

Miroslav Malovec – *Ĉeĥio*



En 1896 naskiĝis en ĉeĥa familio de juda deveno Ota Ginz, poste gvida persono de la ĉeĥa Esperanto-movado. En lernejo instruis lin pri la ĉeĥa lingvo klasika verkisto de historiaj romanoj Alois Jirásek. Dum la unua mondmilito li falis en rusan kaptitecon kiel aŭstria soldato; oni sendis lin kiel laboriston al la bieno de Ŝoloĥov, kie li konatiĝis kun knabo Miĥal, estonta Nobel-premiita verkisto, naŭ jarojn pli juna ol li mem.

Post la milito li fervore laboris por Esperanto. Dum la universla kongreso en Praha 1921 li konatiĝis kun Marie Dolanská, fratino de Božena Sklenčková, edzino de Otto Sklenčka, ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥoslovakio. Parenteze dirite, al la geedzoj Sklenčka en la jaro 1919 naskiĝis filo Ota Sklenčka, el kiu kreskis eminenta aktoro, rolanta en multaj filmoj (li ricevis titolon “nacia artisto”), kiu ĝis sia morto restis membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, verŝajne pro estimo al siaj gepatroj.

Ota Ginz kaj Marie Dolanská komencis kunlabori en la movado kun siaj gefratoj de familioj Sklenčka kaj Dolanský, post kelkaj jaroj geedziĝis kaj en 1928 al ili naskiĝis filo Petr kaj en 1930 filino Eva. Ambaŭ infanoj montris eksterordinarajn kapablojn, literaturan kaj pentristan talenton. Petro verkis poemojn kaj rakontojn, kiujn li mem ilustris. Eva en plenkreskeco fariĝis pentristino.

En 1939 germanaj faŝistoj invadis Ĉeĥoslovakion kiel okupaciantoj, apartigis Slovakion kaj tiel nomatajn Sudetojn (regionojn kun forta germana minoritato) kaj la reston nomis Protektorato Bohemiko kaj Moravio. Komenciĝis persekutado de judoj, kiuj devis porti flavan stelon, iliaj civitanaj rajtoj estis draste limigitaj, atendis ilin transportoj al koncentrejoj. En tiu prema etoso la 11-jara knabo Petr Ginz notis siajn travivaĵojn en sian taglibron kaj verkis ankaŭ romanon en stilo de

Jules Verne, lia plej ŝatata verkisto. En la romano la knabo priskribis teruraĵojn, kiujn faris kontraŭ nigruloj en Belga Kongo la belga reĝo Leopoldo la Dua. Li volis montri, ke faŝismo aperis jam antaŭ 50 jaroj en Afriko kun milionoj da viktimoj. La kriman reĝon satire vipis ankaŭ Mark Twain en 1904 per *Monologo de reĝo Leopoldo*.

En 1942, kiam Petro atingis sian 14-an jaron, li estis sendita al koncentrejo Terezín. Kun aliaj knaboj li tie travivis du jarojn, poste estis sendita al Aŭŝvico kaj tie pereis en gaskamero.

Sed per tio lia historio ne finiĝas. Kiel aktiva knabo li eĉ en tiu horora situacio ne perdis optimismon kaj kun aliaj knaboj komencis eldoni gazeton VEDEM (ni venkas), skribitan permane aŭ tajpitan. Kompreneble en unu ekzemplero, kiu cirkulis inter la knaboj, kiuj ĝin ne nur legis, sed ankaŭ aktive kontribuis. Petro estis redaktoro kaj ĉefa kontribuanto. Kvazaŭ mirakle la kajeroj konserviĝis, kvankam difektitaj, ĝis nia tempo kaj estas posedaĵo de la memorejo Terezín. Ankaŭ aliaj infanoj laŭ lia modelo eldonis similajn gazetojn, el kiuj kelkaj numeroj ankaŭ konserviĝis sub la nomoj Kamarád, Domov (= hejmo) kaj RIM RIM RIM.

En la jaro 2003 flugis en kosmon la kosmopramo Columbia kun 7 personoj, inter ili israela astronauto Ilan Ramon (\*1954), kiu el la jerusalema muzeo Jad Vaŝem elpruntis desegnon de la knabo Petr Ginz kiel simbolon de holokaŭsto. La desegno montras nian Teron rigardatan de la Luno kvazaŭ per okuloj de kosmonaŭto, kiu surluniĝis. Revenante en la atmosferon Columbia kraŝis kaj forbrulis kun la sep astronautoj kaj kompreneble ankaŭ kun la desegno. Sed la reproduktaĵo de la desegno traflugis la tutan mondon kaj vekis grandan intereson pri Petr Ginz kaj pri la travivaĵoj de infanoj en Terezín. Ekestis kvanto da interretaj paĝaroj destinitaj al Petro kaj Terezín, same televidaj dokumentfilmoj kaj Unesko





tekstojn kaj ordigi ilin laŭ jenaj temoj: Vagado tra Terezín - Poemoj kaj rakontoj - Enigmoj, kvizoj kaj ludoj - La respubliko Ŝkid. En *Vagado tra Terezín* oni trovas mapon de la koncentrejo kun numeritaj objektoj kaj kun tekstoj, kiujn la knaboj skribis pri tiuj objektoj en sia gazeto. Laŭ iu rusa libro, tiam populara, pri grupo da knaboj, kiuj nomis sin *La respubliko Ŝkid*, ili ankaŭ nomis tiel sian kolektivon.

Mi skribis al la aŭtoroj de la retejo kaj proponis esperantigon de la tekstoj, kion ili entuziasme akceptis. Mi volis engaĝi nian Esperanto-junularon, esperante, ke la komuna tasko plivigligos ilian agadon. Ankaŭ ili entuziasme akceptis, sed kiam mi vidis, ke nenio okazas, mi mem komencis traduki la tekstojn kunlabore kun junulo Matouš Bičák, iam la plej aktiva el la gimnazianoj, nun jam universitata studento, kiu ĉiun mian tradukon tuj enretigis en sekretan prov-retejon. En la animo mi petis pardonon de niaj esperantistaj junuloj, ĉar la tekstoj estas sufiĉe malfacilaj, do certe ne laboro por komencantoj. La tradukado daŭris unu jaron kaj la 5-an de majo 2016, en la tago de holokaŭsto, la esperantlingva versio estis inaŭgurita ([www.vedem-terezin.cz/](http://www.vedem-terezin.cz/)). Ĝis nun la titolpaĝo anoncas grandafiŝe, ke aperis la traduko en Esperanto.

Tradukante la tekstojn mi konatiĝis kun la vivo en Terezín, kiu estis tute alia ol mi imagis antaŭ la tradukado.

Terezín estas fortreso, fortifikita urbo, kiun en 1780 fondis imperiestro Jozefo la Dua kaj nomis ĝin omaĝe al sia patrino Maria Tereza. Ĉirkaŭas ĝin preskaŭ 4-kilometra remparo larĝa 30 metrojn. Interne estas pluraj kazernoj kaj diversaj helpaj konstruaĵoj bezonataj por funkciado de tia armea komplekso. La fortreso estis uzata kiel malliberejo, en 1918



mortis tie ekzemple 23-jara Gavriilo Princip, kiu en 1914 en Sarajevo atence mortigis arkidukon Francisko Ferdinando de Aŭstrio-Este kaj tiel startigis la unuan mondmiliton.

Dum la dua mondmilito nazioj faris el Terezín judan geton, kie ili koncentris judojn el la tuta Ĉeĥio kaj tie la judoj devis atendi transportojn al likvidaj koncentrejoj. Ili estis loĝigitaj en unuopaj kazernoj laŭ sekso kaj aĝo kaj devis partopreni ĉiutagajn laborojn, sed portis normalajn vestojn kaj relative estis liberaj interne de la fortreso. Tial ankaŭ la knaboj povis vagi tra la geto kaj priskribi unuopajn domojn kaj lokojn, eĉ fari intervjuojn kun kuiristoj, kuracistoj k.s. Preskaŭ povus ŝajni, ke ilia vivo ne tre diferencis de la vivo de nuntempaj rifuĝintoj en tendaroj, nur pendis super ili minaco de transportoj. Sed la statistiko diras, ke el 140 000 homoj, kiuj pasis tra Terezín, mortis tie 35 000 kaj 88 000 estis forsenditaj al koncentrejoj (el kiuj nur 3600 transvivis).

Petro Ginz kun siaj kamaradoj 13/16-jaraj loĝis en iama lernejo, kiu dum ilia restado estis nomita Hejmo Unu kaj nun tie troviĝas Geta Muzeo. Ilia juna instruisto kaj edukisto sekrete ilin instruis en la subtegmentejoj kaj instigis ilin al mem-administrado: ili mem devis zorgi pri higieno kaj ordo, elekti siajn gvidantojn, demokrate solvi problemojn kaj konfliktojn. En la gazeto VEDEM ili skribis poemojn, kvizojn kaj precipe artikolojn pri la vivo en la geto. Ne nur



en Hejmo Unu, sed en la tuta geto. Ili priskribis la kuirejon, manĝejon, kafejon, teatron, futbalejon, banejon, kuracejon, akuŝejon, sepultejon kaj aliajn lokojn de la geto. Kaj multajn travivaĵojn, eĉ konfliktojn inter la homoj, junaj kaj maljunaj, vivantaj en senĉesa streso kaj timo, facile eksciteblaj pro labilaj nervoj.

La gazeto ankaŭ pravas, kiom da talentaj kaj inteligentaj knaboj tie pereis. Ne nur Petro Ginz, sed ekzemple Hanuš Hachenburg, kiu ankaŭ mortis en gaskamero, estis tre talenta aŭtoro. Troviĝas tie poemoj subskribitaj “Orče” – sub ili kaŝiĝas Zdeněk Ornest, kiu transvivis kaj fariĝis grava aktoro (1929-1990) kaj plie estis frato de Jiří Orten (1919-1941), unu el la plej grandaj ĉeĥaj poetoj.

En la jaro 1995 aperis libro en la lingvoj ĉeĥa, germana kaj angla Ĉu mia patrujo estas la getaj muroj?, kiu prezentas konservitajn desegnojn, pentraĵojn, poemojn, rakontojn, teatraĵojn kaj eĉ operojn de la infanoj el la geto de Terezín.

De Petro Ginz estis hazarde trovita en subtegmentejo de malnova domo en Prago lia taglibro, kiun en 2004 eldonis lia fratino Chava Pressburger (Eva Ginzová) sub titolo **Deník mého bratra** (Taglibro de mia frato). La taglibro estis tradukita al lingvoj hungara, hispana kaj kalatuna, angla, franca, germana, japana – sed la unua estis Esperanto en 2005 en traduko de Věra kaj Vlastimil Novobilský (mi helpis kun traduko de du poemoj). La taglibro priskribas la sufokan etoson post la okupacio de la lando, kiam judoj devis porti flavan stelon, ne rajtis veturi per tramo, eniri normalajn vendejojn, iliaj infanoj estis elpelitaj el lernejoj, havis preskaŭ neniajn rajtojn krom atendi transportojn al koncentrejoj.

En 2007 la eldonejo Franz Kafka aperigis alian konservitan verkon de Petr Ginz, romanon **Návštěva z pravěku** (Vizito el pratempo) kun la ilustraĵoj de Petro mem. La romanon li verkis antaŭ forveturo al Terezín, do iam antaŭ sia 14-a jaro. En la antaŭparolo li skribas, ke



li trovis novan romanon de Jules Verne, ĝis nun ne konatan, kaj ke li prezentas ĝin al la publiko. Ĉefa heroo estas inĝeniero Guinness, esperantisto, kiu kun sia infana filo Pierre forveturas al Afriko, konkrete al Belga Kongo, kie neatendite aperis terura prahistoria saŭro, kiu mangâs kaj terorizas la kompatindajn nigrulojn. La inĝeniero devas malkovri, kiameniere tiu monstro povis transvivi milionojn da jaroj kaj kiamenire eblas ĝin likvidi. Post multaj danĝeraj aventuroj kun nigrulo Kola Aĵaj ili likvidas la saŭron kaj konstatas, ke ĝi estas maŝino konstruita de rasistoj, kiuj ekspluatas kaj elrabas la landon. Kompreneble, Pierre Guinness estas Petr Ginz kaj Kola Aĵaj havis modelon en fama nigra esperantisto de la intermilita periodo Kola Ajayi, kiu faris multajn prelegvojaĝojn. Dum verkado Petro ne povis scii, ke la romano iam vere aperos antaŭ la publiko, li verkis ĝin por si mem kaj por sia tirkesto. El la postparolo de lia fratino ni ekscias, ke Petro verkis ankoraŭ 7 aliajn romanojn, sed nur tiu ĉi konserviĝis kompleta.